Prezo: 6 €
www.satesperanto.org
Septembro-Oktobro 2020 | n-ro 09-10 (1383-1384)

# Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA




SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Perantoj

**Aŭstralio** – Franciska Toubale
1 Marne Road, Mount Evelyn, Victoria 3796, Aŭstralio
rete: fran14@bigpond.net.au
**Belgio** – Claude Glady
Rue du Culot, 1 , BE-5630 CERFONTAINE
Tel-Fakso-Respondilo: 00-32- (0)71 644916
Rete: cglady@arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE 50 750-6373051-18, BIC : AXABBE22
**Bosnio-Hercegovino** – Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosna i Hercegovina
rete: fetahzvirac@gmail.com
tel. (poŝa): +387 (0)61 170 094
**Brazilo** – Alex Sousa Santos
Via Principal, P-11, bairro Boa Vista, Green Ville
BR-45027-342 Vitória da Conquista-BA, Brazilo
rete: esperanto1000@gmail.com
tel. (poŝa): +557 7988011780
**Britio** – Arturo Prent
7 Walton Gardens, Hutton, Brentwood, Essex CM13 1EJ, Britio
tel.: +44.1 .277.22.89.62
Nomo: "SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA"
Bank-kodo: 09 01 56 / Kont-n-ro: 57604003
BIC: ABBYGB2LXXX
IBAN: GB62ABBY09015657604003
rete: ap_esp-sat21@yahoo.co.uk
**Bulgario** – Metodi Markov
Vasil Levski, 20; BG-2700 Blagoevgrad; Bulgario
tel. (fiksa): +359 73882791, (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948@abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5; BIC: FINVBGSF
**Ĉeĥio** – Václav Stibůrek
J. Franka 1731, CZ-25601 Benešov, Ĉeĥio
tel.: +420.737230231, rete: stiburek.v@seznam.cz
IBAN: CZ6620100000002900048738
BIC/SWIFT: FIOBCZPPXXX
**Ĉinio** – BRUNO GUY CLAUDE HENRY
rete: esperanto.bhenry@yahoo.fr
Bankkonto n-ro 6217857500009246684
SWIFT kodo/BIC: BKCHCNBJ970
BANK OF CHINA - HUNAN BRANCH N°593 1, Duan Furong Road (M) CHANGSHA - HUNAN - ĈINIO
**Francio** – Barthélémy Maurau
Appartement 120, 3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX, Francio
rete: barthelemy.maurau@free.fr
**Germanio** – Gary Mickle
Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, Germanio
rete: gmickle@nexgo.de

**Hispanio** – Pedro María Sanz Sanz
Apartado 8042, ES-28080 Madrid
rete: pedrosanzsat@gmail.com
Konto: 0182-9465-65-0200272726 (BBVA)
IBAN: ES48 0182 9465 6502 0027 2726
BIC: BBVAESMM
**Hungario** – PETIK Janos (35623)
Hársfa u. 31. I/7
HU-3104 Salgótarján
retadreso: kitepsonaj@gmail.com
**Italio** – Carlo Bourlot
Via Quarello 40, IT-10135 Torino (TO), Italio
rete: carlo.bourlot@gmail.com
Tel.: +39 011 39 70 477; Poŝtel.: +39 333 34 89 280
Poŝtkonto: n-ro 43976158
IBAN: IT88Z0760101000000043976158
BIC: BPPIIRRXXX
**Izraelio** – Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko, IL-26373 Kirjat-Mockin, Izraelio
rete: b48705544@013.net
**Japanio** – Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006, JP-140-0003 Tokyo
rete: sat-peranto-japana@googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon
**Katalunlingvio** – Sandra Vives (KEA)
Apartat 1008, ES-08200 Sabadell, Hispanio
tel.: +34 93 716 36 33, rete: sandra@esperanto.cat
**Koreio** – Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro, Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
rete: paze23@gmail.com
**Kroatio** – Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-poŝte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac), Kroatio
Tel: +385.21.647.059, Poŝtel: +385.098.182.79.07
rete: ivica.scepanovic1@st.t-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
BIC: OTPVHR2X
**Litovio** – Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42, LT89213 Mažeikiai, Litovio
Tel.: +37068736457
rete: grazopul@yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
BIC/SWIFT: HABALT22, Swedbank
**Malagasio** – Justine (Lala) Ralalarisoa
Lot IIC - 72 - FD Manjakaray, MG-101
Antananarivo, Malagasio
rete: llrespr@libero.it
IBAN: MG46 0000 4000 0800 7694 2010 112
BIC: BMOIMGMG
**Norvegio** – Cécile Anda
Esperantoveien, LI, NO-4320 Hommersak, Norvegio
rete: cmranda@frisurf.no
**Portugalio** – PAZ Alexandra (36134) kaj PRIETO Roger (36135)
JOAQUIM ANTONIO DE AGUIAR 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO
retadreso: alexandra.paz@gmail.com
retadreso: rogerprieto@gmail.com
Tel.: +351 916 793 285 / +351 915 067 954
Bankkonto: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL

**Rusio** – Nikolao Gudskov
a/k 57, RU-105318 Moskvo, Rusio
rete: nikolao@yandex.ru
**Serbio** – Miomirka Kovačević
Španskih Boraca 32/2, RS-11070 Novi Beograd, Serbio
rete: miomirka.kovacevic@gmail.com
IBAN: RS35160003020011349313
SWIFT/BIC: DBDBRSBG
**Svedio** – Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202, SE-411 01 Gotenburgo, Svedio
rete: ishim@hotmail.com aŭ ingajohansson50@gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
BIC: NDEASESS
**Svisio** – Richard Schneller
Rue Charles-Knapp 20, CH-2000 Neuchâtel, Svisio
rete: rischneller@gmail.com
Poŝtkonto n-ro 25-158577-1
**Ukrainio** – Andreo JANKOVSKIJ
str. Lajosha Havro 11-B, ap. 68, UA-04211 KIJV, Ukrainio
rete: andreoespero@gmail.com
telefone: 380 67 99 470 03
**Usono** – Brandon SOWERS
PO Box 52731
GA-30355 Atlanta
rete: bsowers@protonmail.com
**Ĉiuj landoj** – SAT-Sidejo
67 av. Gambetta, FR - 75020 Paris, Francio
rete (ĝenerala retadreso): kontakto@satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj@satesperanto.org
Tel.: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

# Kotizoj 2020

| Lando | Jarkotizo | Lando | Jarkotizo |
|---|---|---|---|
| Argentino | 8 € | Kongo, DR | 4 € |
| Aŭstralio | 48 € | Koreio | 36 € |
| Aŭstrio | 48 € | Kroatio | 16 € |
| Barato | 4 € | Kubo | 4 € |
| Belgio | 48 € | Latvio | 12 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € | Litovio | 12 € |
| Brazilo | 16 € | Luksemburgio | 48 € |
| Britio | 48 € | Madagaskaro | 4 € |
| Bulgario | 8 € | Makedonio | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € | Malio | 4 € |
| Ĉinio | 8 € | Meksiko | 12 € |
| Danio | 48 € | Mongolio | 4 € |
| Estonio | 16 € | Nederlando | 48 € |
| Finnlando | 48 € | Nepalo | 4 € |
| Francio | 48 € | Norvegio | 48 € |
| Germanio | 48 € | Pollando | 16 € |
| Grekio | 8 € | Portugalio | 24 € |
| Haitio | 4 € | Rumanio | 12 € |
| Hispanio | 36 € | Rusio | 12 € |
| Hungario | 16 € | Serbio | 8 € |
| Irano | 8 € | Slovakio | 16 € |
| Irlando | 48 € | Slovenio | 16 € |
| Islando | 36 € | Svedio | 48 € |
| Israelo | 36 € | Svisio | 48 € |
| Italio | 44 € | Tajvano | 32 € |
| Japanio | 48 € | Turkio | 12 € |
| Kanado | 48 € | Ukrainio | 4 € |
| Kolombio | 8 € | Usono | 48 € |

**DUMVIVA MEMBRECO: 1 300 €**

Por **Francio**, **Germanio**, **Hungario** kaj **Norvegio**, pagu al la SAT-konto en Parizo (vidu detalojn en "**Ĉiuj landoj**") sed nepre informu la peranton kaj la SAT-kasiston pri via pago.

> Por la nemenciitaj landoj la ĉi-jara baza kotizo al SAT estas 4 €. La PK indikos la prezon de la postaj jarkotizoj.

> **Nura abono al Sennaciulo: 75% de la kotizprezo en la koncerna lando.** Pagante ĉi sumon, nemembro povas jaraboni *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Aktiva membro pagas la plenan jarkotizon. Li/ŝi ricevas, perrete kaj surpapere, *Sennaciulon* + ĝian jaran suplementon *Sennacieca Revuo*.

> Help- kaj grup-membroj pagas minimume duoblon de la plena jarkotizo kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Malriĉaj emeritoj, kiuj ne povas pagi plenan jarkotizon, senlaboruloj kaj junuloj (ĝis 25-jaraj) pagas minimume la duonon de la plena jarkotizo, kaj ricevas la samajn rajtojn kaj servojn.

> Samfamiliano de membro pagas la duonon de la jarkotizo. Li/ŝi ĝuas la samajn rajtojn (ekzemple dum kongreso) sed ne ricevas la asocian organon nek la SAT-Adresaron.


*Sennaciulo*
Organe officiel de SAT / Oficiala organo de SAT

**Siège de SAT / Asocia sidejo de SAT**
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
*Retadreso:* kontakto@satesperanto.org
*Retejo:* http://satesperanto.org
*Tel.:* (+33) 09 53 50 99 58
*Poŝtkonto:*
1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

**Plenum-Komitato de SAT**
*Prezidanto:* Vinko Markovo
*Vic-prezidanto:* Pedro Sanz
*Sekretario:* Diana Riŝar
*Kasisto:* Bruno Henry
*Vic-kasisto kaj eldonestro:* Guy Cavalier
*Ceteraj membroj:* Paz (Jung Hyunsoo), Dieter Rooke, Dominiko Simeone
*Reprezantoj de SAT en la LEA-Komitato:* Paz kaj Dieter Rooke

**Sennaciulo**
*Redaktoskipa kunordiganto:* Vinko Markovo
*Vic-kunordiganto:* Pedro Sanz
*Enpaĝiganto:* Nicolas Raymond
*Ceteraj redaktantoj:* Masako Tahira (Masakato), Gary Mickle, Rob Moerbeek, Grazina Opulskiene, Marcel Redoulez, José María Salguero (Kani), Richard Schneller, Serĝo Sir' kaj Franciska Toubale
*Kontribuojn sendu elektronike al:*
sennaciulo.redaktejo@gmail.com
*aŭ paperpoŝte al*:
SAT-Amikaro
132-134 boulevard Vincent Auriol
FR-75013 Paris, Francio
*Pri financaj aferoj sendu al:*
financoj@satesperanto.org
*Libromendojn sendu al:*
libroservo@sat-amikaro.org
*Librajn eldonproponojn sendu al:*
pimskrabo@yahoo.fr
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.
Imprimé par/*Presita de:*
TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris.
Aperas dumonate - Bimestriel.
Directeur de la publication: Guy Cavalier
Abonnement annuel/*jara abono:*
France 36 €
Autres pays/*aliaj landoj:* petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.
Dépot légal à la date de parution:
N° CPPAP 05 25 G 86567

# REDAKTANGULO

Karaj legantoj,

Jen, post longa paŭzo, ampleksa numero septembra-oktobra de *Sennaciulo*. En ĝi vi trovos abundan materialon pri la 93a SAT-kongreso, la unua, kiu okazis en la sennacieca interreto. Vi cetere jam notu, ke la 94a SAT-kongreso, dum kiu ni festos la centjariĝon de SAT, estas planita en Bjalistoko inter la 25a de Julio kaj 1a de Aŭgusto 2021. Ne hezitu tuj plenigi la kunsenditan aliĝilon. Sciu ankaŭ, ke PIV 2020 nun estas mendebla. Atendante pli detalan traktadon en *Sennaciulo*, bazaj informoj pri tio aperas en la SAT-retejo.

La amplekso de tiu ĉi numero ŝuldiĝas al aktiva partopreno de diversaj kontribuantoj. La aktualaĵoj de la pasintaj monatoj estas abunde tuŝitaj kaj, aldone, venis pluraj reagoj pri antaŭaj artikoloj. Tiel, *Sennaciulo* plenumas sian rolon de interŝanĝejo, kies plua vigleco dependas de ĉiuj el ni. Reagoj estas aparte bonvenaj, ĉar ili plej kongruas kun la nuna redakto-politiko de *Sennaciulo*, kiu favoras la debaton. Sed, ideale, ĝi okazu en kamaradeca tono, sen personaj miskreditigoj inter la aŭtoroj. La celo estas kleriĝi, ne militi inter ni. Kompreneble, ĉiu verkanto disvastigas siajn ideojn, sed la esenco de *Sennaciulo* ne estas la propagando, sed la helpado al la legantoj mem krei siajn proprajn vivkonceptojn per komparado, analizado, pripensado pri la malsamaj opinioj de la diversaj aŭtoroj.

Kun tiu ĉi numero ankaŭ estas dissendita papera voĉdonilo pri la kandidatoj por la venonta PK, prezentitaj ĉi-numere, kaj pri la kandidatoj por geografiaj sektoroj de la Ĝenerala Konsilantaro, prezentotaj en la tuj venonta numero. Kiel antaŭ tri jaroj, tiuj el vi, kiuj estas retpoŝte atingeblaj, ankaŭ ricevos ligon por partopreni rete en la baloto.

Agrablan kaj partopren-instigan legadon deziras al vi

La Redaktoskipo

## Frontpaĝa bildo

Loĝ-lokoj de la partoprenantaro de la 93a SAT-kongreso en la reto. Kreis Pŝemek Wierzbowski.

# Enhavo


**Raportoj pri la 93a SAT-Kongreso**
4 Gvidrezolucio
4 Deklaracio
5 Oni elturniĝis kun la neĉeesta formo
7 Resumo pri kongresaj laborkunsidoj

**Tra la Mondo: Ameriko**
10 Black lives matter! Nigrulaj vivoj valoras!
11 Martin Luther King Jr. rilate ribelajn kontraŭagadojn
12 Letero al la filminto de la agonio de G. Floyd
13 Tuskegee
14 La usona revo
14 Informoj pri Venezuelo

**Tra la Mondo: Eŭropo**
16 La lasta vorto de Svetlana Prokopjeva dum ŝia juĝproceso
18 La reala situacio en Belorusio
19 Pollando: ĉu la fina mispaŝo de PiS?
21 Manifestacio kontraŭ rasismo en Svislando
22 Kripligita flavveŝtulo elektita en urbodoma balotado

**Tra la Mondo: Mezoriento**
23 "Turkio estas disvolvanta strategion por revivigi la Islaman Ŝtaton"
23 La fantomo de komunismo
25 Turkio komencis enketon kontraŭ 400 kurdaj aktivuloj vivantaj en Germanio
26 La plej bazaj homaj rajtoj en Irano
28 "Oni ne volas en Mezoriento demokratan ekzemplon kia la nia"

**Tra la Mondo: Azio**
30 Kio estas la Kannama?
31 Formiĝis preparsocieto por "Hokkajda Societo por la Laborista Sindikato Kannama"
31 Ĉu honestaj zorgoj pri la rajtoj de la honkonganoj aŭ senskrupula fi-agitado kontraŭ Ĉinujo?

**Medio**
32 Aŭstralio kaj klimata plivarmigo

**Historio**
35 Socialismo kaj religio
37 Rimarkoj pri *30-jariĝo de la falo de la Berlina Muro*

**Intelekta memdefendo**
38 Rimarkoj pri *La homaro ŝancelita kaj la socio kolapsigita far malgranda etaĵo*
39 La paradokso de la larmigaj gasoj
40 Vortmilito

**El la SAT-Administrejo**
40 Donacintoj
48 Kandidatoj por la Plenum-Komitato de SAT, mandatperiodo 2021-2024
49 Novaj aliĝoj

**Komunista Frakcio**
41 Festo Avante (antaŭen) en Portugalio

**Liberecana Frakcio**
42 Subprema Turkio: Forpaso de la kantistino Helin Bölek

**Beletro**
43 Hispana somero (1)
44 La forkurantoj
51 Kaj oni restis hejme

**SAT-anoj aktivas**
46 Kurso de Esperanto en la kooperativo Unicepe

**El la LEA-oj**
47 Agadraporto de ASELT (Asocio Sennacieca de Esperantistoj-Laboristoj en Togolando)

**El la leterkesto**
47 Dankletero de WALDON Billy (32720)

**Nekrologo**
49 Stella, kara Stella
50 Émile Mas


*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn ni ne resendas. Kontribuojn sendu al:*

*SENNACIULO.REDAKTEJO@GMAIL.COM*

# Gvidrezolucio

La 93-a SAT-Kongreso okazinta perinterrete de la 26-a ĝis la 31-a de julio 2020:

– ĝojas pri la abunda partopreno de kongresanoj en la ĉi-jara reta kunveno, kaj instigas ilin laŭeble aliĝi al la venontjara jubilea kongreso en Bjalistoko;

– danke registras la proponojn por venontaj kongresoj en Moskvo (2022), Osako (2023) kaj Bara-do-Garso, brazila Amazonio (2024), kun espero, ke longtempa antaŭplanado helpos utiligi ilin por daŭra vigligo de la tiea SAT-movado;

– konsiderante la sukceson kaj partoprenon de samideanoj el la tuta mondo en ĉi tiu virtuala retkongreso de SAT, proponas, ke la venontaj kongresoj de SAT estu farotaj miksante la ĉeestajn kongresojn kun la virtualaj eblecoj de aktivaj partoprenoj, favore al la integriĝo de la membroj, kiuj ne povas, pro ajnaj kialoj, vojaĝi kaj partopreni en la ĉeestaj jaraj kongresoj kaj kunvenoj de SAT;

– gratulas pro la presado de nova eldono de la *Plena Ilustrita Vortaro*, tre baldaŭ ekspedota al Esperantaj libroservoj, kaj pri la samtempa enhava ĝisdatigo de la retejo vortaro.net, kun apero tie de aldonaj serĉ-funkcioj;

– alvokas SAT-anojn plifortigi per aliĝo la skipon de *Sennaciulo*;

– alvokas SAT-anojn spertiĝi pri uzado de la enhavmastruma sistemo de la SAT-retejo;

– salutas la ampleksigon de historiaj tekstokolektoj kiel ekzemple *Militrakonto* kaj la *Esperanta Vikifontaro*, konservantaj la historian memoron de SAT kaj ĝenerale de la laborista movado, kaj proponas al SAT-anoj subteni tiujn projektojn;

– salutas la proponon iniciati kunlaboron de portugallingvaj SAT-anoj, eventuale en la formo de LEA;

– alvokas al pli vigla kampanjo por fari SAT pli videbla en sociaj retejoj kaj varbi esperantistojn per utiligo de diversaj rimedoj kaj organizado de aleksteraj eventoj en la interreto;

– kuraĝigas la membrojn utiligi siajn talentojn por vigligi progreseman Esperanto-kulturon per kreado kaj publikigo de kantoj, poezioj, grafikaĵoj, filmetoj, kaj aliaj artformoj;

– subtenas la iniciatojn pli aktive varbi progresemajn junajn esperantistojn kaj restarigi la Junulfakon de SAT;

– kuraĝigas siajn membrojn kaj frakciojn daŭrigi la sukceson de la reta SAT-kongreso per regula kaj vigla interŝanĝado de ideoj kaj agadoj en la interreto;

– alvokas por pli efika agado; SAT rilatu kun eminentaj sciencistoj por plenumi sian klerigan celon;

– alvokas SAT-anojn partopreni per skribaj kontribuoj en Sennaciula dosiero: post/dum la nuna sankrizo ni imagu venontan mondon, tutmondiĝan, sed humanisman kaj medi-protektan;

– bonvenigas la aperon de la libro *Veganismo*[1], aparte aktuala en la kunteksto de la kronvirusa pandemio, kaj alvokas al larĝa diskonigo de tiu verko inter la esperantistaro kaj unuavice SAT-anaro;

– bonvenigas la reeldonon de *La rajto je Pigro* de Paŭlo Lafargo, kunlabore kun Monda Asembleo Socia (MAS), kaj feliĉas pri la libera disponigo en la bitarkivo de plej multaj eldonoj de la iama SAT-broŝurservo;

– kuraĝigas al organizontoj de venontaj SAT-kongresoj okazigi programerojn kun rekta engaĝiĝo kun lokaj popolanoj, ekzemple ekskursoj al sindikatejoj, kamparoj, aŭ ie ajn, kie subpremataj popolanoj loĝas aŭ laboras, kaj ebligi rektan lernadon el ili.

[1] pri “veganismo”: https://eo.wikipedia.org/wiki/Veganismo

# Deklaracio

La 93-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazinte perinterrete de la 26-a ĝis la 31-a de julio 2020:

– alvokas SAT-anojn kaj progresemajn fortojn jam nun ekserĉi la konkludojn tirendajn el la kronvirusa krizo, cele forturni aktualajn danĝerojn: san-rilatajn, limigon de civitanaj kaj laboristaj rajtoj, pri informiĝo, k.t.p.;

– solidaras kun homoj de la tuta mondo trafitaj de la pandemio, laŭdas kaj dankas sanlaboristojn kaj ĉiujn, kiuj ebligis daŭrigon de ĉiutaga vivo en la socio pro ilia nemalhavebla kaj senlaca laboro, kaj kondolencas al familioj, kiuj perdis siajn anojn pro la pandemio;

– fronte al la oftiĝo de zoonozoj, konstatante, ke kapitalismo bezonas plialtigi la konsumon, inkluzive de bestoj, esperas, ke la homaro trovu ekvilibron kiel parto de la naturo, kio postulas drastan malaltiĝon de konsumado de bestodevenaj nutraĵoj;

– konstatas, ke en la pandemio plej suferas la laborista klaso kaj la loĝantaro de malpli evoluintaj landoj, kaj postulas, ke por solvi la krizon pagu la kapitalista klaso, kiu en la lastaj jaroj akumulis enormajn riĉaĵojn;

– plie postulas, ke laboristoj estu protektataj en sekuraj laborkondiĉoj por preventi pluan disvastiĝon de la kronviruso, kaj ke rifuĝintoj estu evakuitaj el tro dense loĝataj provizoraj kampadejoj;

– alvokas la Mondan Organizaĵon pri Sano, landaj registaroj, kaj sciencistoj kaj fakuloj de la tuta mondo pli aktive kunlabori por laŭeble rapide venki la pandemion;

– apogas feminismon kaj la sociajn kaj politikajn movadojn, kiuj luktas por la rajtoj de virinoj kaj infaninoj, kiuj suferas ekspluatadon, malriĉecon kaj diskriminacion en la tuta mondo;

– alvokas defendi disigon inter la ŝtato kaj la eklezioj en la tuta mondo;

– alvokas defendi la liberecon de konscienco kontraŭ ĉiuj dogmoj en la tuta mondo;

– kondamnas la faŝisman kaj nekompetentan reĝimon de Rodrigo Duterte, prezidento de Filipino, kaj subtenas la demokratian movadon en ĝia longdaŭra lukto en tiu lando;

– subtenas la homrajtan movadon en Hongkongo kaj kontraŭas la novan leĝon pri nacia sekureco de Ĉinio, uzatan por silentigi kritikojn;

– rilate la alproksimiĝantajn prezidantajn balotojn en Belorusio alvokas la aŭtoritatojn de tiu lando respekti la civitanan rajton de demokrata elekto sen persekutado de la opoziciuloj;

– proponas, ke SAT aliĝu al la porpaca kampanjo de UEA – lige kun la jubileo de UN;

– postulas, ke neniu ŝtato en la mondo tenu militajn garnizonojn en aliaj ŝtatoj aŭ intervenu en ili;

– konstatis, ke 6 miloj da rifuĝintoj estas blokitaj ekde pluraj monatoj en la greka insulo Samoso; kaj alvokas eŭropajn respondeculojn, por ke ili rapide decidu akcepti tiujn rifuĝintojn en siaj landoj.

### SENNACIECA KONGRESO TUTMONDA

# Oni elturniĝis kun la neĉeesta formo

La 6-taga ĉi-jara kongreso de SAT (26-a ĝis 31-a de julio, 2020) restos en memoro kiel "bjalistoka" kongreso pro la lerta reĝisorado de Pŝemek W., kiu biciklis ĉiutage de sia hejmo al la Bjalistoka Esperanto-Centro kaj mastrumis la retan kunvenejon en Zoom. Eroj de la kongreso kun loka rilato ja ankaŭ koncernis Bjalistokon, kiu gastigos la venontjaran kongreson – *se* la pandemio retroiros kaj *se* la plu daŭranta bestekspluatado ne regalos nin per nova zoonozo. Memorata estos la kongresado sur sennacia tereno – en interreto.

Kvankam por multaj la pandemio venis kiel surprizo, fakuloj fakte antaŭavertas de jaroj, ke precize io tia minacas. Multaj ne volis pensi pri ĝi, des malpli pri eblaj preventaj agoj, kiuj malverŝajnigus tian okazaĵon. Sed tio estas alia temo. La subite aperontaj specifaj defioj estis ĉiuokaze ne antaŭscieblaj. SAT ne sola frontas tiajn, kaj interese estas kompari la spertojn de SAT kun tiuj en aliaj medioj. Du fakuloj pri universitata instruado resumis la spertojn, kiujn ili gajnis en sia medio en freŝdata artikolo [1]. Ili rimarkas plirapidiĝon de jam antaŭe antaŭvideblaj evolutendencoj: "... la koronoviruso efikis nur tion, kio konekse kun la rompa ŝanĝiĝo pro la ciferecigo jam klare konturiĝis". Ili notas, ke en la universitata medio "... relative bone elformiĝinta individua baza cifereca kompetento ekzistis, kiam temis pri senantaŭprepara utiligo de ciferecaj instruaj kaj lernaj formatoj kaj aplikaj programoj" kaj demandas, ĉu ne indas daŭrigi iujn krizkaŭzitajn praktikojn post la pandemio, specife: "kial iuj enhavoj ne povas esti plu perataj loksendepende". Ili konstatas la avantaĝojn, ke "la transiro al enretaj formatoj en la instruado kondukas ne al malpli, sed al pli da komunikado – dokumentita, cetere, en babilejaj

